
tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

aprilo 2001



2001: La Eŭropa lingvojaro

Esperanto kandidatas por Nobelpremio pri paco kaj Nobelpremio pri literaturo 2001

Universala Kongreso de Esperanto – en Kroatio parto de la nacia programo de la Europa Lingvojaro 2001

Esperanto gastos en Diplomatia Akademio en Kroatio

Ĉiĉeronoj por UK sin preparas

ISSN 0352-1583

KARAJ LEGANTOJ



Dum ni skribas tiujn ĉi liniojn estas aprobitaj la unuaj subvencioj por prezento de la nacia programo dum la zagreba UK. Ministerio de kulturo kaj Urba oficejo pri kulturo aprobis subvenciojn por prezento de la kroata kulturo dum UK. La scenaron por la Nacia vespero preparas Judita Rey Hudeček kiu gvidas ankaŭ publikajn rilatojn de la UK en Zagrebo. En la kongreso prezentiĝos la plej fama kroata folklora ensemblo *Lado*, tre prestiĝa zagreba ĝazisto Matija Dedić kun sia muzika trio kaj la fama zagreba kantistino Josipa Lisac. En aparta segmento de la Nacia Vespero prezentiĝos ankaŭ la zagrebaj artistoj kiuj uzas Esperanton kiel rimedon en sia kultura laboro: aktorino Vida Jerman, operkantisto Neven Mrzlečki, kanzonistino Lada Kos.

Judita Rey Hudeček estas taskigita ankaŭ por aranĝi publikan dancon de kongresanoj kaj urbanoj sur la ĉefa placo de la urbo, la Placo Banuso Josip Jelačić.

Vida Jerman diligente ekzercas kun siaj kolegoj por enkonduki la kongresanaron en la plej faman zagreban teatran ejon Kroatan Nacian Teatron.

Pluraj kroataj parlamentanoj kaj membroj de la registaro kaj universitataj profesoroj ricevis dankleteron de la Nobelkomitato el Oslo por partopreno en la kandidatiga kampanjo por la Nobelpremio pri paco 2001. (Sur la foto: Željka Antunović, vicprezidanto de la Kroata Registaro akceptis en januaro Judita Rey Hudeček, Spomenka Štimec kaj Marta Kovač por informiĝi pri la preparlaboroj por UK en Zagreb kaj pri kandidatiĝo de UEA por la Nobelpremio pri paco.)

En marto la helpantoj de LKK partoprenis en seminario pri helpantoj gvidita de Nikola Rašić. En aprilo helpantoj de Turisma Fako, organizitaj de Faruk Islamović, kun turisma ĉiĉerono vizitis Zagrebon kaj tradukadis por fake kaj lingve spertiĝi pri la kongresurbo. La sama teamo en majo planas ekskursi al la lagoj de Plitvice por spertiĝi.

En aprilo gastis en Zagrebo Masayuki Saionji, japana masaĝisto kaj havis publikan prelegon en Urba hospitalo por prezenti sian masaĝmetodon al kroataj masaĝistoj. Li planas publike prezenti sian masaĝmetodon al kroataj terapiistoj en Osijek kaj en aŭtuno 2001 okazigi seminarion pri la metodo.

En majo Kroation vizitos Julia Sigmond el Rumanio, invitita de KEL, por helpi levi la lingvan nivelon de la helpantoj de LKK.

Ministerio pri kulturo aprobis subvencion al Tempo okaze de ties 20jara aperado! (Ni korektu informon pri *Tempo* el la lasta numero: *Tempo* ĉesis aperadi nur en 1992 kaj aperis neniu numero en la militaj jaroj 1993 kaj 1994.)

En julio 2001 la kongresa urbo Zagrebo malfermas siajn pordojn al esperantistoj. Bonvenon!

S. Š.

Tempo

Jaro XX, numero 1/2001
Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo

Aperas laŭeble kvar foje jare
Eldonas Kroata Esperanto-Ligo
ISSN 0352-1583
Redakcio: Kneza Mislava 11/III, Zagreb, Kroatio
tel: (385 1) 46 17 550, fakso: (385 1) 46 19 373
rete: esperanto@zg. tel. hr
http:pubwww.srce.hr/esperanto-kel

Tiu ĉi numero estas eldonita per la helpo de Kroata Ministerio pri Kulturo

Kontribuis: Ivo Borovečki, Lada Kos - Josip Velebit, Vladimir Dujnić, Gordana Jurina, Sonja Kozar, Zora Heide, Vjekoslav Morankić, David Rey, Meredith Simon, Spomenka Štimec, Sanja Težulati, Mirjana Žeželj.

Entajpis: Milka Đukić kaj Spomenka Štimec

Lingve konsilis: Lucija Borčić

Redaktoris: Spomenka Štimec

Anonc-tarifo 1/1 paĝo 800 kn , 1/2 paĝo 500 kn, 1/3 paĝo 350 kn, 1/8 paĝo 200 kn.
Eta anonco 100 kn. (kovrilpaĝo duoble).

Abono
4 numeroj jare 40 kn (10 DEM)
unuopa numero 10 kn (2,5 DEM)
Bv. aldoni sendokostojn 1,5 DEM por ĉiu numero al eksterlando.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj en la subskribitaj tekstoj.
Redakcija ne odgovara za mišljenja iznesena u potpisanim člancima.

ESPERANTO KANDIDATAS POR NOBELPREMIO PRI PACO KAJ NOBELPREMIO PRI LITERATURO 2001

En la jaro kiam la Nobelpremio festas sian centjaran jubileon, Esperanto kandidatas por la Nobelpremio pri paco. Esperanto per si mem estas tro abstrakta fenomeno kaj ne troviĝas en la kategorio kiu rajtas ricevi la prestiĝan premion, kandidato por la Nobelpremio pri paco estas Universala Esperanto-Asocio.

Dum la komitatkunsido en Tel Aviv la komitato taskigis la konatan kroatan esperantiston, juriston Ivo Osibov esplori la kondiĉojn pri la Nobelpremio pri paco pri kiu UEA jam foje senrezulte kandidatiĝis. Osibov kunmetis interesan dokumenton el kiu esperantistoj povas lerni kiuj instancoj rajtas kandidatigi por la Nobelpremio pri paco kaj kia estas la regularo de la prestiĝa monda premio.

El lia informilo eblas informiĝi ke ĉiuj kandidatigaj leteroj devas atingi la Nobelkomitaton en Oslo ĝis la 1a de februaro.

Kiu entute rajtas fari proponojn por la Nobelpremio pri paco? Estas interese informiĝi pri la reguloj: Rajtas kandidatigi

a) membroj kaj estintaj membroj de la Nobel-Komitato sed ankaŭ la konsilistoj nomitaj de la Norvega Nobel-Insituto

b) membroj de parlamentoj kaj de registaroj de suverenaj ŝtatoj, kaj membroj de Interparlamenta Unio

c) membroj de la Internacia Arbitracia Kortumo en Hago

d) membroj de la Konsilantaro de la Internacia Pac-Buroo

e) membroj de la Instituto de la Internacia Juro

f) universitataj profesoroj (ne docentoj aŭ rektoroj) en tute konkretaj fakoj: pri politika scienco, juro, historio, filozofio

g) personoj aŭ organizoj, kiuj jam ricevis Nobelpremion pri paco

Kroata Esperanto-Ligo enketis inter kelkaj parlamentanoj, membroj de la registaro kaj profesoroj de la menciitaj fakoj por vidi ĉu iu opinius ke Esperanta organizo meritus la Nobelpremion pri paco. Al kelkaj la ideoj ne placis. Aliaj esprimis sian pozitivan opinion.

Dum la enketado aperis interesa opinio ekz. de la historiisto d-ro Neven Budak, dekano de la Filozofia fakultato en Zagreb. Li diris ke li kiel historiisto ĉiun jaron ricevas demandon ĉu li havas kandidaton por proponi por la Nobelpremio sed ke li neniam proponis iun ĉar li ne havis taŭgan kandidaton. Plaĉis al li informiĝi pri porpaca laboro de UEA.

Kiel argumenti pri la porpaca laboro de UEA?

En Roterdamo aperis broŝuro de Ulrich Lins *The work of the Universal Esperanto Association for a more peaceful world.* La broŝuro en la serio Esperanto-Dokumentoj sur 12 paĝoj argumentas pri la porpacaj atingoj de Universala Esperanto-Asocio. Bibliografio kaj listo de la adresoj de E-asocioj en la anglalingvaj landoj kompletigas la informon.

Post pli detala informiĝo pri Esperanto el Kroatio estis senditaj 7 apartaj kandidatigaj leteroj al la Nobelkomitato en Oslo. Pretas deklari Esperanton matura por kandidatigo por la Nobelpremio: vicprezidanto de la Kroata Registaro Željka Antunović kaj tri parlamentanoj Dorica Nikolić, Jovan Bamburač kaj Dražen Budiša. Du profesorinoj pri juro Magdalena Maršavelska el la Universitato de Zagreb kaj Sofija Marušić el la Universitato de Split kaj unu profesoro pri historio Neven Budak sendis apartajn leterojn de subteno. La leteroj iris al Oslo en diversaj lingvoj. Du leteroj estis verkitaj en la norvega lingvo, du en la sveda, unu en la angla, unu en la kroata... Ili ricevis dankleteron el Oslo pro partopreno en la kandidatigo por la Nobelpremio pri paco.

Ivo Osibov sukcesis kolekti informojn ke en la jaro 2001 36 personoj el 11 landoj proponis UEA por Nobelpremio por paco. La leteroj de subteno venis el jenaj landoj: Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Grekio, Hispanio, Israelo, Korea Respubliko, Litovio, Makedonio kaj Usono.



Alfred Nobel (1833-1896)

Ĉu vere en Japanio kaj Brazilo neniu universitata profesoro pri juro, historio au politika scienco opinias ke indus subteni la kandidatigon? Au ĉu simple, kiel ofte ĝis nun esperantistoj okupiĝis pri tro da diversaj aferoj kaj la celita informado ne troviĝas inter la plej gravaj preferoj?

Kiel ajn estas, laŭ la ĵurnaloj 144 asocioj kaj individuoj kandidatas por la Nobelpremio pri paco en la jaro 2001. Inter la kandidatoj troviĝas ekz. Internacia Ruĝa Kruco kaj Monda Asocio pri Futbalo sed ankaŭ la generala sekretario de OUN Kofi Annan. Oni dirus ke Universala Esperanto-Asocio troviĝas en bona societo.

Sed ankaŭ por la Nobelpremio pri literaturo ĉijare pluraj Esperantaj organizoj kandidatigis William Auld. Li estas kandidato jam la trian jaron.

En decembro, dum la ĉefa festo de la centa jubileo de la Nobelpremio ni atendas la rezultojn.

Kroatio gastigas Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro kiam UEA kandidatas por la Nobelpremio por paco. Toston kaj bondeziron al la kandidatoj, UEA kaj William Auld! Eĉ se ne gravas gajni, gravas partopreni.

S. Štimec

ESPERANTISTO SALUTIS INTERNACIAN PRILINGVAN KONFERENCON EN ROVINJ

Eŭropa jaro de lingvoj – 2001 estas oficiale lanĉita far la Eŭropa Komisiono la 28-30an de februaro en la sveda urbo Lund. Kadre de tiu prilingva kampanjo okazos 18 gravaj internaciaj konferencoj kaj aranĝoj por la subteno kaj protekto de lingva kaj kultura riĉecoj de Eŭropo.

Post la Internacia Foiro pri lingvoj kaj kulturoj okazinta en Prago fine de februaro (Expolingua Praha 2001), okazis en la kroata apudmara urbo Rovinj Internacia konferenco *Lingva diverseco-defio por la Eŭropaj urboj kaj regionoj.* La 22-an de marto kolektiĝis en la hotelo Sol Park ĉ. 150 renomaj linvistoj, profesoroj pri lingvoj kaj altrangaj funkciuloj el dudeko da landoj por aŭskulti kaj pridiskuti 50 prelegojn pri la lingva diverseco en Eŭropo, pri la regionaj kaj minoritataj lingvoj, kaj pri la lingvaj problemoj de gastlaboristoj, enmigrintoj kaj iliaj infanoj.

La konferencon organizis kelkaj institucioj de la Eŭropa Konsilio kaj Ministerio por Eŭropaj integriĝoj de Kroatio, kies ĉefo ministro Ivan Jakovčić malfermis la konferencon. La plej altranga partoprenanto estis Lordo Russell Johnston, prezidanto de la Parlamenta Asembleo da la Eŭropa Konsilio. Estas interese mencii ke sian enkondukan paroladon Lordo Russel Johnston komencis per la konstato ke *bad English* (malbona angla lingvo) estas hodiaŭ *lingua franca* de Eŭropo. La Konferencaj laborlingvoj estis la kroata, franca, angla, germana, itala kaj rusa, sed ĉiujn prelegojn kaj diskutojn samtempe tradukadis profesiaj interpretistoj.

La spaco ne permesas al mi detale priparoli la prelegojn, sed tamen mi mencios nur kelkajn aparte interesajn: Prof. John Trim el Kembriĝo parolante pri diversaj problemoj de la lingva diverseco, menciis ankaŭ d-ron Zamenhof kaj Esperanton. Li diris ke Esperanto havis certan sukceson, sed ke *la tuta afero restis je kluba nivelo.* Prof. Mirjana Vilke el Zagreb parolis pri la graveco de instruado de fremdaj lingvoj al la infanoj en la frua lerneja aĝo, kaj s-ino Anera Adamik el Rijeka klarigis la bilingvismon en la Kroatia regiono Istrio, kie oni parolas du lingvojn: la kroatan kaj la italan. S-roj Demine kaj Arslanov, parolante en la rusa, tre interese prezentis la lingvan situacion en Karelio (apud la landlimo kun Finnlando), kaj en la urbo Kazan (Tatarstan-Rusio) kie oni parolas 115 minoritatajn lingvojn. La konferencon mi ĉeestis kiel oficiala observanto de Kroata Esperanto-Ligo. Dum la unua diskut-serio mi salutis (kroat-lingve) la ĉeestantojn en la nomo de KEL kaj poste menciis ĉiujn Esperantajn aranĝojn okazontajn en Kroatio en la kadro de la Eŭropa jaro de lingvoj. Precipe mi akcentis la okazontan UK de Esperanto en Zagreb. Finante mi atentigis ke la lastan frazon mi parolos en Esperanto estante certa ke ili ĉion bone komprenos, kaj mi diris:

Estimataj kaj karaj amikoj, mi salutas vin en la nomo de Kroata Esperanto-Ligo kaj al via konferenco pri la lingva diverseco mi deziras plenan sukceson!

Jam dum la unua laborpaŭzo venis al mi pluraj ĉeestantoj demandante pri Esperanto. Apud mi sidis la urbestro de la slovaka urbo Martin, s-ro Stanislav Bernát kiu demandis min pri iu slovaka esperantisto kiun mi ne konis. Mi montris al li libron pri la Seminario *Multkulturaj familioj de la nuntempa Eŭropo* okazinta antaŭ 5 jaroj en Bratislavo. Aliris min kroata profesoro Vladimir Košćec el Varaždin alparolante min en bona Esperanto kaj klarigis al mi ke la lingvon li lernis en la kurso kiun gvidis la elstara kroata Esperanto-poeto Božidar Vančik. Prof. Hruŝlov el Moskvo diris al mi ke li persone konas la rusan lingvistonesperantiston Magomet Asajev. Ni ambaŭ legis lian bonegan ruslingvan verkon *Lingvo kaj nacio.* Al li mi montris Rusan-Esperantan vortaron de Bokarev, kiun mi *tute hazarde* portis en la teko. La sekvan tagon de la konferenco mi parolis pri la signifo de la tradukado en la plurlingva Eŭropa Unio, sed aparte mi akcentis altajn kostojn de la tradukaj servoj. Fine mi dankis pro la grava kaj altkvalita laboro de la interpretistoj dum tiu ĉi konferenco.

Dank' al la bona ideo de KEL sendi al la konferenco oficialan observanton, la ĉeestantoj de tiu grava Eŭropa prilingva konferenco havis la nekutiman okazon aŭdi de sur la podio ne nur priesperantan diskuton, sed ankaŭ Esperantajn vortojn.

D-ro Ivo Borovečki

INVITO AL ĜEMELAJ URBOJ DE ZAGREB

Ĉu vi loĝas en Kioto, Krakovo, Pekino, Birmingamo, Brno, Bolonjo, Budapeŝto, Bonaero, Vieno, Lisbono, Pitsburgo, Plovdiv, Mainz, St. Petersburg, aŭ ĉu eble en Cluj-Napoca en Rumanio, en Tromso en Norvegio aŭ en la usona Dayton? Se vi estas loĝanto de iu el la menciitaj urboj, vi estas aparte bonvena al aldona kongresa programero.

Kial?

Kroata Esperanto-Ligo lanĉis specialan programon por la kongresanoj de la ĝemelaj urboj. Tiuj kongresanoj havos dum la zagreba UK specialan ĉambron je dispono. Tie estas planata renkontiĝo kun ĵurnalistoj al kiuj ni ŝatus prezenti ke esperantistoj estas la sola kategorio de la loĝantoj de la ĝemelurboj, kiuj povas sin senĝene kompreni.

En la ejo interalie deĵoros japaninoj el la ĝemela urbo Kioto. La amikeco de la urboj Zagreb kaj Kioto daŭras jam dudek jarojn. Okaze de la jubileo dum UK la japanaj gastinoj planas starigi ekspozicion de bildleterojn, prizorgita de Micukaua Sumiko. En la ĝemelurba ĉambro ili krome planas montri kiel praktiki paktukon (japane HUROŜIKI). Ili pakos vinbotelon, akvomelonon, skatolon, instruos fari mansakon kaj dorsosakon. Aldone al la japanaj lecionoj pri pakado oni servos japanan teon.

Julia Sigmond el Cluj-Napoca en Rumanio anoncis lumbildan prelegon pri la Monda preĝtago.

Zagreba artistino Marija Igaly kun siaj nevinoj Sonja kaj Marta Kovač gvidos kurson pri florpentraĵoj laŭ ŝia tekniko TOMAGO.

Ni turnis nin al la urbestro de Zagrebo Milan Bandić kaj petis sendi specialan invitleteron al la ĝemelaj urboj kaj inviti ke la urboj sendu esperantiston al la renkontiĝo de ĝemelurbaj delegacioj en Zagreb.

Esperantistoj el la ĝemelaj urboj estas bonvenaj pli detale prezenti siajn urbojn ekz. Kio estas aktuale la plej granda urba projekto en la koncerna urbo. Ili estas bonvenaj ankaŭ alporti salutleterojn de la urbestroj.

Ni planas organizi akcepton ĉe la urbestro por la ĝemelurbanoj kaj aparte prezenti ilin dum la urbestra akcepto.

Ĉu ankoraŭ iu emas iel kontribui al la ĝemelurbaj renkontiĝoj en Zagreb? Bv. kontakti la redakcion de Tempo.

S. Š.

Kroataj esperantistoj en Italio

Du esperantistoj el Kroatio, Daniel Rožić kaj Vladimir Dujnić kadre de la projekto de kunlaboro inter la ĝemelurboj, vizitis la bolonjan esperantan grupon la 10-an de aprilo. Bolonjo estas unu el la ĝemelurboj de Zagrebo kaj pro tio niaj gastigantoj en Bolonjo estis speciale gastigemaj.

Dum la vizito al esperanta grupo *Achille Tellini 1912* en Bolonjo ni renkontiĝis kun kelkaj anoj de la klubo. Al la klubo ni lasis la nove faritan vidbendon pri Kroatio. Ni tranoktis en la domoj de du esperantaj familioj kaj morgaŭ, la 11-an nin bonege tra la urbo ĉiĉeronis Mario Amadei, sekretario de bolonja esperanta grupo, montrinte al ni, nur dum kelkaj horoj, preskaŭ ĉiujn vidindaĵojn de Bolonjo. Bolonjon oni nomas la urbo kiu estas klera kaj grasa; klera pro sia longdaŭra kaj sukcesa universitata tradicio kaj grasa pro la manĝaĵo kiu estas specifa por Bolonjo.

Post la adiaŭo de la neforgesebla Bolonjo ni daŭrigis nian vojaĝon al la urbeto Bolsena ĉe la samnoma lago. Tie ni, kune kun aliaj kroataj esperantistoj, partoprenis la junularan E-renkontiĝon organizitan de Itala Esperanta Junularo, la jubilean 25-an Internacian Junularan Festivalon kies temo estis *2001-Lingva Odiseo.*

Modesta festivalejo gastigis ĉ. 100 partoprenintojn plej parte el eŭropaj landoj. La aranĝo okazis de la 11-a ĝis la 17-a de aprilo. Per diversaj prelegoj, laborgupoj, ekskursoj aŭ per simpla interkonatiĝo kaj interamikiĝo partoprenintoj povis spekti kaj sperti la tutan riĉecon de diverseco inter la lingvoj, landoj, kutimoj kaj popoloj.

Ni dum la IJF prezentis la vidbendon pri Kroatio kaj la Universalan Kongreson.

Daniel Rožić
Vladimir Dujnić



Ne maltrafu en Zagrebo la novan teatran premieron!

LA PLEJ LONGA TAGO DE MARIA THERESIA

Vida Jerman, la aktorino kiu dum la lastaj jardekoj regas sur la Esperanta scenejo, nun efektive prenis la imperiestran sceptron en la manon: en la plej prestiĝa zagreba teatro (kiun per la martelfrapo malfermis la viena imperiestro mem) ŝi surscenigas sian plej imponan rolon – tiun de la imperiestrino Maria Theresia.

La impereistrino kiu stampis tutan epokon kaj kies politika kaj gusta influo elradiis vasten ekster la Habsburga Imperio, kiu decidis pri la sortoj de siaj subuloj, oficiroj kaj sciencistoj, jen aperas en sia imperiestra oficejo, tedata per ĝenado de du viroj – unu juna jezuito-kroata sciencisto kaj la dua – sia propra edzo, la aŭstra imperiestro Franz la Unua. En la fono de la prezentaĵo figuras la imperiestra lito, aludante pri tiu grava rekvizito de la imperiestraj decidoj de ŝia mosto.

La konata kroata dramisto Miro Gavran ŝatas interpreti historiajn personojn kaj meti ilin en novan lumon. Lia dramo *La amoj de Georgo Washington* (kies Esperantan tradukon persigis Aktar Etemadi kaj ukrainigis Viktor Pajuk) nun aperas antaŭ la Esperanta publiko per la traduko de Klaus Dahmann.

Vida Jerman portis sian teatran karieron en Esperantujo per solula aktora vivo, unuiĝis por la nova teatraĵo kun du konataj zagrebaj aktoroj, el kiuj la prestiĝa aktoro Žarko Savić en la rolo de la imperiestro Franz realigis notindan rolon de sia aktuala teatra kariero. La juna promesplena Ivica Pucar, en la rolo de la retiriĝema sciencisto, ne volas cedi sian sciencan malkovron por pliaj imperiestraj konkeroj kaj ne lasas sin misgvidi per la imperiestra ĉarmo. En tiu teatraĵo li la unuan fojon elpaŝas al la esperanta scenejo. La triopo kompletigita per la prestiĝa zagreba reĝisoro Ivica Kunčević realigis per la Teatra ensemblo Ponto, estrata de Vida Jerman, unue la kroatan version de la teatraĵo, kies premiero estis la 5an de februaro 2001.

Aktuale estas preparata la Esperanta versio de la verko.

La ruĝa kurteno de la zagreba Kroata Nacia Teatro solene malfermiĝos antaŭ la kongresa publiko la 23an de julio 2001 kaj Vida en la ruĝvelura imperiestra robo ekregos la scenejon. En tiu rolo ŝi klopodis ankaŭ fizike simili al la imperiestrino, uzante ŝiatipan frizaĵon, perukon, ornamaĵon, ne nur sagacon, ruzon kaj obstinon. Ŝi levas la vualon de la budoaraj sekretoj en kiuj ankaŭ imperiestroj aperas kiel homoj.

S. Štimec



BALADO PRI KOLOROJ

Sonĝhore terglobo venigas min kie
korpuro ĉiun ornamas
sen trist' ĉagreno sen vundoj kaj ĉie
la homaj virtoj samas.
Azie mamnutras panjoj idojn
kvankam per flavaj du manoj
en rizokamparo kreskas la homoj
kaj strebas penlukti por pano.

Rondiras rondiras terglobo senhalte
kaj flavas la Ter' kiel spikoj
pafiloj jam mortis patrinoj ekfloris
vizaĝoj oranĝe jen flavas
sunflor' se dorm-ĝuas kamparo ne bruas
kaj tiu silent' flavoras
kaj blanko kaj ruĝo kaj nigro jen flavas
kiam kamp-meze vi vojas.

Sonĝhore terglobo venigas min kie
korpuro ĉiun ornamas
sen trist' ĉagreno sen vundoj kaj ĉie
la homaj virtoj samas.
Afrike mamnutras panjoj idojn
kvankam per nigraj du manoj
ĉe l' bordoj de Nilo kreskas la homoj
kaj sonĝas pri korpo-ornamoj.

Rondiras rondiras terglobo nun ĉiuj
deziroj kaj tagoj 'stas noktoj
la kosmo lum-brilas kaj pensoj 'stas steloj
kaj steloj 'stas hom okulparo
se maro eknigras ĝi brilas pli forte
kun lun' vaganta sed ĝoja
kaj blanko kaj ruĝo kaj flavo jen nigras
kiam kamp-meze vi vojas.

Sonĝhore terglobo venigas min kie
korpuro ĉiun ornamas
sen trist' ĉagreno sen vundoj kaj ĉie
la homaj virtoj samas.
Amerike mamnutras panjoj idojn
ĝojkoraj ruĝ-mane sen plendoj
ĉe Andaj krutaĵoj kreskas la homoj
kaj iĝas gardantoj de l' gentoj.

Rondiras rondiras terglobo kaj tuta
ĉi vivo jen: arda sun-flamo
en ni bat-pulsas kaj blanka kaj nigra
kaj flava kaj ruĝa kor-amo
kaj ĉiuj panjoj mamnutru idojn
naskiĝu nur homoj veraj
sur Tero estu plena libero
kaj ĉiu hom-sent' sincera.

L.Kos-L.Kos-J.Velebit

Noto:
Dum la Nacia Vespero de la zagreba UK la publiko havos la okazon aŭdi la baladojn kantatajn de la konata zagreba kanzonistino Lada Kos. Ŝin duete akompanos alia fama zagreba aktorino-kantistino Lela Margetić. Jen unu el la baladoj de la koncerta repertuaro.

Višnja Stahuljak

ĈIUTAGA SVARMO

Ĉiutaga svarmo.
Tkalčićeva-strato
proprajn ombrojn kolektas.
Sekretajn memorojn
sensone fortiktakas la sunhorloĝo,
kaj en la antikva Skalinska-strato
frapado de petolemaj paŝoj
foriras al senreveno.

Tradukis: Zora Heide


Noto:
Konata zagreba Esperanta poetino Zora Heide tradukis la tutan poemaron de la prestiĝa zagreba verkistino Višnja Stahuljak.

86a UNIVERSALA K ZAGREBO

Universala
Kongreso de Esperanto
Zagrebo - Kroatio
2001

Temo: Kulturo de dialogo - - dialogo de kulturoj

Libro de Nane Annan en Esperanto kaj la kroata



Nane Annan, sveda pentristino kaj edzino de la ĝenerala sekretario de OUN aŭtoris fotolibron pri Unuiĝintaj Nacioj, kiu celas servi kiel helplibro por elementaj lernejoj de la mondo. Usona Forumo por Tutgloba Edukado eldonis la libron en 1999. D-ro Humphrey Tonkin, la reĝisoro de la kongresa temo de la zagreba UK, iniciatis la eldonon de la libro en Esperanto.

Damir Mikuličić, konata zagreba eldonisto, planas eldoni honore al UK en Zagreb du volumojn de la verko en la kroata kaj en Esperanto. La tekston por la Esperanta eldono tradukas Anna Löwenstein.

ESPERANTO GASTAS EN KROATA DIPLOMATIA AKADEMIO

Ambasadoro de Kroatio en Hungario, granda amiko de Esperanto, D-ro Stanko Nick, proponis al Kroata Diplomatia Akademio akcepti prelegon pri la temo Esperanto kaj Universala Kongreso de Esperanto. La direktoro de la Diplomatia Akademio D-ro Mladen Andrlić akceptis la temon kiel unu el prelegoj dum la maja horaro de la zagreba Diplomatia Akademio. Gastprelegos Spomenka Štimec.

FILMO *MIRINDA KROATIO*

Kroata Turisma Asocio eldonis lastatempe novan turisman filmon pri Kroatio kaj preparis ankaŭ ties Esperantan eldonon por la partoprenantoj de UK. La filmo de la daŭro de 16 minutoj, reĝisorata de la konata kroata TV-reĝisoro Baldo Čupić, prezentas diversajn turismajn aspektojn de Kroatio. La muzikon por la filmo verkis Đelo Jusić, esperantigis Davor Klobučar kaj voĉlegas la tekston Spomenka Štimec.

La interesitoj povas mendi la videobendon kontraŭ poŝtkostoj de la bendekspedo.

HRVATSKA

ONGRESO DE ESPERANTO
21-28 JULIO 2001

Prezidento Stjepan Mesić kaj la urbestro Milan Bandić kontribuis por la Kongresa Libro

Prezidento de la Respubliko Kroatio Stjepan Mesić kaj la urbestro de la urbo Zagreb jam sendis siajn fotojn kaj tekstojn por la Kongresa Libro per kiuj ili bonvenigas la kongresanojn al la plej granda Movada renkontiĝo 2001 en Zagrebo.

Amasloĝejo je dispono de kongresanoj

Amasloĝejo por kongresanoj, kiuj ne havas multan monon por pasigi la kongresan semajnon en Zagrebo, estas trovita! En ĝi bedaŭrinde ne eblas manĝi. La kostoj de la kompleta tranoktado dum la kongresa semajno estas 35 EUROj. Bonaj tramaj ligoj kun la kongresejoj!

Esplanade - la plej ŝatata hotelo

El la ĝisnunaj aliĝintoj el 55 landoj la plej multaj elektis la plej specifan zagreban hotelon nomata *Esplanade*. La hotelo estis la ĉefscenejo de la Universala Kongreso de Esperanto en 1953. Post la famuloj kiaj Jesephine Baker, Charles Lindberg, Laurence Olivier, Vivian Leigh, kaj politikistoj Nikita Hruščov, Richard Nixon aŭ la Reĝino Elisabeth la Dua, ankaŭ multaj kongresanoj enskribiĝos en la hotelan gastlibron.



IN 2 - DONACIS KOMPUTILON

In2, la zagreba firmao okupiĝanta pri informatika inĝenieriado, posedata de Ante Mandić, estas unu el la kongresaj aŭspiciantoj. La firmao disponigis al la kongresa oficejo - komputilon. Ante Mandić estis intertempe proklamita por la plej bona kroata manaĝisto 2000.

Seminario por helpantoj

Domaĝe ke nur 4 LKK-anoj partoprenis la seminarion por helpantoj en Hrašćina-Trgovišče: Željka Kelava, Faruk Islamović, Vladimir Dujnić kaj Spomenka Štimec. Mi esperas ke la aliaj LKK-membroj ne atendas ke iliaj helpantoj serĉos iliajn bildojn en la kongreslibro por scii kies helpanto ili estas. Aŭ ĉu eble la aliaj LKK-anoj ne bezonas helpantojn?

Ĉu iu povus skribi la liston de ĝeneralaj taskoj en unuopaj fakoj de LKK? Tiamaniere eble la helpantoj povus pli facile elekti la ĝustan fakon.

Sanja Težulati



En la bieno Njeguš en Hrašćina-Trgovišće okazis la 24an de marto 2001 seminario por la helpantoj de la zagreba Universala Kongreso. La seminarion gvidis Nikola Rašić. Partoprenis 43 diversaĝaj helpantoj. La celo de la seminario estis ekkoni la organizadon de UK kaj trovi sian lokon en ĉi tiu kompleksa okazaĵo. Rašić tre klare priskribis kaj eksplikis la rolon de ĉiuj partoj de la funkciado de UK. Spomenka Štimec gastigis la partoprenantojn de la seminario kaj organizis la vegetaran matenmanĝon, kiun fervore preparis Zlata Nanić, la anino de *Bude Borjan.*


Inter la prelegoj de Rašić la ehlpantoj povis ĝui belegan veteron kaj bongustan manĝaĵon, ekkoni la historion de la bieno, konatiĝi kun aliaj helpantoj. La sekvonta seminario okazos en majo kaj ĝis tiam ni helpantoj devus trovi nian rolon dum la UK.

La sekovonta seminario okazos en majo kaj ĝis tiam ni helpantoj devus trovi nian rolon dum la zagreba UK.

Gordana Jurina

POŜTMARKO POR UK

Okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb Kroata Poŝto jene reklamas pri la Kongreso kadre de sia oficiala flugfolio pri la poŝtmarkoj de la Kroata Poŝto 2001:



Kion aĉeti en Zagrebo?

Eble vi ŝatus informiĝi pri iuj kroataj inventaĵoj, aĉeteblaj kiel zagrebaj memoraĵoj. Povus interesi vin ke ĝuste en nia ĉi-jara kongresa urbo estis inventitaj la unua meĥanika skribilo kaj la fontoplumo. Eble vi ŝatus koni la fakton ke el Kroatio devenas la plej ofte virmoda akcesoraĵo, kravato. Ankaŭ malgrandaj ruĝkoloraj mielkukoj simbolas Zagrebon.

SKRIBILO NOMATA PENKALA

Penkala estas la familia nomo de unu el la plej famaj zagrebaj inventistoj, Slavoljub Penkala (1871-1922). Li patentis en la jaro 1906 la unuan meĥanikan skribilon kies internan grafitan parton eblis reŝarĝi. Nuntempe memore al la unuaj meĥanikaj skribiloj kiuj revoluciis la skribilojn de la mondo aĉeteblas Penkala-skribilo, produktita laŭ la praa modelo el la jaro 1906.

Slavoljub Penkala inventis ankaŭ fontoplumon, termobotelon, akvovarmigilon. Li registris sepdekon da diversaj patentaĵoj.

Parolante pri diversaj inventoj devenantaj el Kroatio, ni menciu ke konata kroata fizikisto Faust Vrančić en la jaro 1605 desegnis la unuan paraŝuton... kiu devis atendi du jarcentojn por realiĝi kiel grava ilo en aerotransporto.

Darko Blažić

Kroatio - la patrolando de kravato



Esti en Kroatio kaj ne havigi la faman kravaton »Croata« estas kvazaŭ esti en Parizo kaj ne vidi la faman turon Eiffel.

Ĉar Kroatio estas la patrolando de kravato.

Kravato estas invento kiun Kroatoj donacis al la tuta mondo. Pro tio oni en la nomo de kravato en germana, hispana, franca kaj en iuj aliaj lingvoj povas trovi nomon de Kroatoj.

Malnovaj libroj diras ke malgranda popolo konkeris pli vastan spacon ol Batu-kano kaj Napoleono.

En la mezo de 17a jarcento la kravato komencis konkeri la mondon sen bataloj kaj ĝi konkeris la tutan mondon. Kaj hodiaŭ oni povas vidi spurojn de tiu konkero.

La simbolon de mia popolo, la kravaton, multaj homoj en la mondo portas apud sia koro.

Kravato estas la plej bela Kroata memoraĵo.

Kiel oni nomas tiun vestobjekton *kravato* en via lingvo?

David Rey, 14 jara

MIELKUKOJ

De iamaj tempoj kiam foiroj de diversaj varoj estis kutimaj, semajne aŭ monate, homoj trinkis mieltrinkaĵojn kaj infanoj volis ricevi ion specialan kion ili povas aĉeti nur en la foiro. Tia specialajo estis mielkuko en formo de bebo, ĉevalo, frukto aŭ en formo de koro kun malgranda spegulo ene. Tre ofte super la spegulo estis strofoj aŭ versoj de diversaj sencoj (amstrofoj, patriotaj versoj aŭ bondeziroj) kiun knabo povis aĉeti por la knabino kiun li amas. La versoj, ekzemple diras: *Tri floroj, tri folioj/ĉu vi vere amas min/se kor' via por mi ne batas/diru, diru, forgesos mi vin.* Patriota strofo kutimas diri: *La koron vi ne donu al fremdlando/la koron vi donu nur al hejmlando* kaj bondeziraj estas: *Dio donu al vi/Feliĉon, bonan sanon kaj forton/Plezuron kaj pli grandan ĝojon/Dum tuta tago kaj nokto.*

La tempoj pasis, la mielkukoj restis. Nun oni povas aĉeti ilin en kermesoj aŭ en specialaj kandelovendejoj. En Kroatio estas populara baleprezentaĵo, kun folkloraj motivoj, kun la titolo *Mielkuka koro.* La muzikon verkis kroata muzikisto Krešimir Baranović.

Kiam la kuko estas freŝe bakita, oni eĉ povus ĝin manĝi. Sed ne faru tion! La dolĉeco de la kuko ne daŭras tiom longe kiom oni povas ĝui, rigardante ĝin!

En Kroatio dum kristnaskaj festoj vi povas vidi kristnaskan abion ornamitan per mielkukaj fruktoj – pomoj kaj ĉerizoj kaj per malgrandaj koroj. Tamen vi aĉetu grandan koron, ĉar Zagrebo havas la saman koron por vi!



Mirjana Žeželj

ESPERANTISTOJ RIJEKAANOJ EN TELEVIDO

La 26an de januaro televida stacio *Kanal R* en Rijeka, en mozaika programo kun intervjuoj kun diversaj gastoj, gastigis ankaŭ esperantistojn en daŭro de ĉirkaŭ 15 minutoj.

Partoprenis la intervjuon Vjekoslav Morankić, prezidanto de Esperanto-Societo Rijeka kaj Vladimir Margan, membro de la prezidantaro de la societo.

Vjekoslav Morankić parolis pri la agado de Esperanto-Societo en Rijeka kaj pri Esperanto-movado ĝenerale, kaj Vladimir Margan pri siaj impresoj dum sia per kaj por esperanta, pli ol dumonata, vojaĝo tra Rusio, Kazakio, Uzbekio, Kirgizio, Turkmenio, Irano kaj Turkio. Ni akcentis ke la ĉefa rolo de la societo estas organizi kursojn por komencantoj, ebligi al anaro bone ellerni lingvon t.e. paroligi membraron, ebligi al ĉiu membro establi kontaktojn kun eksterlandanoj en sia propra fako aŭ persona intereso. Inter aliaj demandoj ekaperis jena: En la nuna globaligo de la mondo, esperanto perdas pozicion kaj kia estas situacio nun? Vjekoslav Morankić respondis jene: *Ni esperantistoj ne neas gravan rolon de lingvoj de grandaj potencoj kiel lingvoj germana, franca, itala, angla kaj aliaj. Sed internacia kunlaboro okazas ankaŭ en aliaj lingvoj. Ekzistas sennombraj lingvaj niĉoj. Ĉu ni scias en kiu lingvo komercas japanoj el Kalifornio kun sia propra lando Japanio? En internaciaj rilatoj ankaŭ esperantistoj komunikas inter si kiel lingva niĉo. Mi tute hazarde havas ĉi tie unu libron per kiu mi povas tion argumenti, malgraŭ tio ke mi ne intencis ĉi vespere pri ĝi paroli.* Por montri ke la afero estas serioza mi prezentas libron *Inkotermoj 2000* kiun eldonis Internacia Ĉambro de Komerco en Parizo en kunlaboro kun esperantista faka organizaĵo (Intervenis gvidantino per *Montru la libron al kameraoj.* Mi tion faris kaj la libro estis videbla tra plena ekrano). *Pri la libro ekinteresiĝis miaj amikoj komercistoj en Kroatio sed malgraŭ tio ke klaŭzoj estas en du lingvoj, en Esperanto kaj la angla, ĉiuj klarigoj de kondiĉoj estas nur en Esperanto, pro tio al neesperantistoj kiuj scipovas angle el tiu libro povas esti je dispono nur klaŭzoj sed ne klarigoj.*

Post la respondo, emitado de la programo estis daŭrigita per aliaj demandoj.

Vladimir Margan parolis tre interese pri siaj pasintjaraj vojaĝoj. Li informis pri siaj renkontoj kun esperantistoj en tiuj foraj landoj, pri siaj travivaĵoj en vilaĝoj en Uzbekio, pri vivo en tendo. Li laŭdis manĝojn en tiuj landoj kaj speciale laŭdis bongustajn fiŝojn.

Vjekoslav Morankić

Noto:

Kroata Televido elsendis plurajn aliajn elsendojn menciinte Esperanton.

Ekz. okaze de la Eŭropa Lingvojaro, knabo David Rey, kadre de la elsendo pri la germana lingvo parolis pri siaj spertoj pri libroj kaj Esperanto.

La plej grandan televidan sukceson havis Davor Klobučar, membro de la prezdantaro de KEL, la 6an de februaro 2001 en la populara kvizo TV-elsendo nomata *Cirklo de la bonŝanco.*

Helpantoj anonciĝis

Pluraj helpantoj el eksterlando pretas kontribui al la sukceso de la kongreso en Zagreb.

Studento Tim Westover el Usono akceptis la taskon zorgi pri la kongresa TTT-paĝaro dum la kongresa semajno. Du esperantistinoj el Kioto Tahira Masako kaj Micikaua Sumiko el Kioto anoncis sin por helpi al la programo pri ĝemelaj urboj. Julia Sigmond el Rumanio venos jam en majo por lingve trejni helpantojn de UK. Ŝi pretas viziti kelkajn urbojn por paroligi kroatajn kongresanojn sen multa lingva sperto.

Sigita Staisunaite el Litovio pretas alveni pli frue por per masaĝo kontribui al glata funkciado de LKK dum la lasta semajno de la preparlaboroj. Wang Peirjan el Ĉinio demandas ĉu necesas lingva helpo dum la kongresaj preparlaboroj. Japanino Hiroko Sugitani pretas alveni unu monaton pli frue por helpi en la preparlaboroj. El Dresden, kun bondeziroj de D-ro W.M. Schwartz al la adreso de LKK venis pakaĵo kun kukoj por LKK, kiu helpis al ni akiri plian artikolon pri UK en la gazetaro.

Koran dankon al ĉiuj pro la kuraĝigo!

S.Š.



FAKAJ ORGANIZOJ EN UK

Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Keppel Enderby en sia lasta Novjara mesaĝo interalie akcentis la gravecon de agado de fakaj organizoj por antaŭenigo de Esperanto-movado. Li ekzemple akcentis, ke per Esperanto oni devus aĉeti ŝarĝaŭton en Europo kaj vendi ĝin en Afriko. Do, agado en diversaj flankoj en la homara socio estas grava por nia movado kaj tiun agadon nun plej parte plenumas fakaj organizacioj. Kroata Esperanto-Ligo ankaŭ subtenas tiujn agadojn, ĉu laborante en diversaj projektoj (kulturaj, lingvaj, junularaj, edukaj kaj aliaj). Sekve de tio, konforme al la statuto de KEL dum la lasta nacia kongreso estas oficiale fonditaj du fakaj sekcioj: kroata sekcio de KEL por ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kaj Sekcio de Entreprenistoj, komercistoj kaj ekonomikistoj (SEKE). La celo de la sekcio-SEKE de KEL estas establi fakan kunlaboron inter agantoj je tiuj kampoj en Kroatio kaj organize kunlabori kun fakaj organizacoj kiuj agadas internacie. Gvidanto de la sekcio estas Vjekoslav Morankić (Adreso: Lipa 40/E, 51000 Rijeka, tel: 051-228 148, reto: esperanto-ri@ri.tel.hr)

Ekzistas dekoj da fakaj organizoj kiuj agas je ekonomia kampo internacie. Ili estas plej parte membroj de UEA. Por ni entreprenistoj, komercistoj kaj ekonomikistoj la plej gravaj internaciaj organizaĵoj estas IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomika Fakgrupo, organo: La Merkato) kaj TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj, organo: La Domo). Dum universalaj esperanto-kongresoj tiuj du organizoj bone kunlaboras. Regule estas vizitataj lokaj aŭ naciaj Komercaj ĉambroj, krome oni vizitas fabrikojn kies produktado estas interesa en internacia merkato. Agado de entreprenistoj, komercistoj, konstruistoj ekonomikistoj kaj aliaj aferistoj dum la kongreso estas specifa, kaj por prezentado de nacia ekonomio kaj produkto-povo tre grava. Dum la Zagreba kongreso kroatoj, membroj de nia sekcio SEKE kaj membroj de IKEF kaj/aŭ TAKE, prizorgos agadon de kongresanoj en nia medio. Radenko Milošević transprenis taskon organizi akcepton de IKEF-TAKE delegitaron en Zagreba Ekonomia Ĉambro. Li organizas ankaŭ viziton al entrepreno (fabriko) en Zagreb. Ankaŭ Vjekoslav Morankić asistos en tiu laboro, sed estas petataj ankaŭ aliaj niaj membrojfakuloj helpi dum la kongreso en kunlaboro kun fakaj organizoj.

Vjekoslav Morankić

Turismaj ĉiĉeronoj praktikas en Esperanto

La 86a Universala Kongreso de Esperanto disponas pri 34 turismaj akompanantoj, membroj de KEL, kun licenco de la oficiala turisma agentejo Generalturist. Ili estas rajtigitaj helpantoj pri turismo dum UK.

La 7an de aprilo la oficiala kongresa agentejo Generalturist organizis por grupo el ili vizitadon al la turismaj vidindaĵoj de Zagrebo kun aldonaj tradukekzercoj. Ĉiĉeronino parolis kroate, esperantistoj tradukis. Tuja simultana traduko estas malfacila tasko eĉ por fluaj parolantoj de Esperanto. Ni devas dum la venontaj tri monatoj ankoraŭ multe spertiĝi pri malfacilaj esprimoj. En la aprila ekzerco en eklezia centro partoprenis 22 esperantistoj, 15 akompanantoj, 7 observantoj. Nia venonta trejnado okazos dum la vizito al la Lagoj de Plitvice.

Faruk Islamović




El niaj kluboj

Rijeka

Esperanto-Societo el Rijeka ricevis subvencion de 5000 kn de la urbo Rijeka por partoprenigo de siaj membroj en la zagreba kongreso.

Varaždin



Esperanto-Societo *Božidar Vančik* post la jarkunveno la 12an de marto havas novan prezidantaron:

Stanko Rukelj, prezidanto; Janja Kelava, vicprezidanto, Snježana Rusman, sekretariino, Ljerka Kučić, kasistino.

Esperantisto el Varaždinske Toplice Antun Prstec, kies fruktoproduktoj *pirbrando* kaj *vino* estis plurfoje premiitaj dum la Vinfoiro en Varaždin en 2000, preparis brandskatolon kun Esperantlingva teksto.


Osijek

Esperanto-Societo *Liberiga Stelo* antaŭkongrese gastigas Internacian Konferencon de Medicinistoj-Esperantistoj kaj atendas ĉ. 80 partoprenantojn. La urbo Osijek aprobis subvencion por la aranĝo.

Davor Klobučar, prezidanto de la societo, iniciatis distribuon de E-lerniloj kaj vortaroj en ĉiuj urbaj bibliotekoj. Li cetere en februaro partoprenis televidan kvizon *Cirklo de la bonŝanco* en kiu li gajnis ne nur konsiderindan monsumon sed la konata TV-anoncisto Oliver Mlakar salutis la spektantojn, honore al la partoprenanto el Osijek, en Esperanto.

En Zagreb similan libroiniciaton faris Sanja Težulati, kiu per Esperantaj libroj provizis Bibliotekon Vladimir Nazor. Imitinde!

Zagreb




Esperanto-Societo *Bude Borjan* ricevis subvencion de Registaro de Kroatio kaj de Urba oficejo por klerigado por organizo de Internacia Infana Kongreseto prizorgata de Ankica Jagnjić. Ekde oktobro ŝi gvidas kurson por 10 zagrebaj infanoj partoprenontaj en IIK. En *Bude Borjan* funkcias dum la lastaj monatoj 4 kursoj gvidataj de Vera Roknić, Nedeljko Korasić, Vladimir Dujnić kaj Spomenka Štimec.

Studenta Esperanto-Klubo havas sian retpaĝon prizorgatan de Vanja Radovanović.

http://www.angelfire.com/sk2/sek/index.html. En SEK funkcias konversacia kurso.

Jelena Štefanić kantos La Esperon



Jelena Štefanić (1983), talentita lernantino de la fama Muziklernejo el Varaždin, kantos por la partoprenantoj de la 86a Universala Kongreso de Esperanto la Esperantan himnon, en iom speciala koncerta prezentiĝo. Jelena planas ekde aŭtuno 2001 studi muzikon en la Viena Muzikakademio kaj estas per sia Esperanta repertuaro je dispono de Esperantaj kulturaj aranĝoj de Mezeŭropo.

http:pubwww.srce.hr/esperanto-kel/ukzagreb.htm

LA AMOJ DE GEORGE WASHINGTON

verkita de Miro Gavran

Recenzo el la libro

Antologio de kroataj unuaktaj dramoj

kompilita de D-ro Branko Hećimović

Redaktis Spomenka Štimec

Eldonis Kroatia Esperanto-Ligo, Zagreb, 1997

221 paĝoj, 16x24 cm

La libro enhavas dek dramojn verkitajn fare de dek aŭtoroj. Ĝi komenciĝas per notoj de la kompilinto pri la kroata drama literaturo kaj teatro, kaj finiĝas per liaj notoj pri la aŭtoroj kaj la aktoroj kiuj jam prezentis la kroatajn dramojn en Esperanto.

Mi okupiĝis pri la dramo *La amoj de George Washington* verkita de Miro Gavran, aŭtoro kiu ofte traktas temojn el historio. Ĉi-tiu dramo esploras amon kaj solecon pere de renkontiĝo inter Martha, la vidvino de la unua prezidanto de Usono, kaj la iama amatino de la fama generalo kaj politikisto. Gavran aldonis rimarkon post la fino de la dramo en kiu li priskribis lian sonĝon pri George Washington. Supozeble, Washington vortpentris al li bildon pri tiu renkontiĝo inter siaj du amoj.


Legante ĉi-tiu kortuŝan dramon mi sentas iom da maltrankvilo. La vidvino invitis la amatinon viziti ŝin kelkajn semajnojn post la morto de George Washington. Ŝi deziras scii kia virino estas la amatino de ŝia edzo: ĉu la amatino vere amas lin? Ĉu ŝi estas hontomiena? Ĉu ŝi vere estas putino? Ŝi volas montri al la amatino la vunditecon kaj solecon kiun ŝi sentis pro la amafero. Sed ankaŭ la amatino havis similajn sentojn: la samaj solecon kaj vunditecon.

Finfine – mi ne estas certa pri la vero - ĉu George Washington amis la edzinon, la amatinon, ambaŭ, aŭ nek unu nek la alian. Leginte la dramon restas al mi pensdemandoj, sed ankaŭ iu trankvila kaj iom kompata senco ke ĉiuj tri homoj restas kaj solaj kaj iel kunaj.

Meredith Simon
(Kursano en San Francisko)

Biblioteko de *Bude Borjan*





Biblioteko de Esperanto-Societo *Bude Borjan* estas starigita en la nova Esperanta oficejo de KEL en la strato Kneza Mislava 11. Tie nun troviĝas 1500 libroj el la biblioteko de Bude Borjan kaj aldone la hereditaj bibliotekoj de Emilija Lapenna (800 libroj), Mirko Manner-Mamužić (800 libroj), Božidar Vančik (200 libroj) kaj Josip Velebit. Sur la fotoj: Faruk Islamović kaj Irina Barač en la biblioteko Lapenna, Dan Đaković en la Biblioteko Manner-Mamužić.


1
marka
Briefmarke
timbre
stamp
KONGRES U ZAGREBU
21.07.2001.
NI ATENDAS VIN EN ZAGREBO